

Protokolo ĉe la jarkunsido de ILEI-se  
la 19-an de majo 2012 en la Popola domo,  
Södergatan 65, Helsingborg.  
Ĉeestis 10 membroj.

1. La prezidanto Agneta Emanuelsson malfermis la kunsidon kaj bonvensalutis la partoprenantojn.
2. Jenaj funkciuloj por la jarkunsido estis elektitaj:
  - prezidanto: Agneta Emanuelsson
  - sekretario: Sten Svenonius
  - protokolkontrolantoj kaj kalkulantoj de voĉdonoj: Bertil Andreasson kaj Ann-Louise Åkerlund.La listo de elektantoj kun 10 membroj estis aprobita. En la momento de voĉdono en § 13 ĉeestis 8 membroj.
3. La laŭstatuta anonco de la jarkunsido estis aprobita.
4. La tagordo estis aprobita.
5. La jarraporto de la estraro estis prezentita kaj komentita de la prezidanto kaj aprobita de la kunsido.
6. La ekonomia raporto estis prezentita de la kasisto kaj aprobita de la kunsido.
7. La revizora raporto estis laŭtleĝita kaj aprobita.
8. La estraro ricevis malŝarĝon por 2011.
9. Estis decidite labori laŭ la proponoj de la ILEI-se konferenco en la 18-a de majo.
10. Estis decidite ke la membrokotizo de ILEI-se por la jaro 2013 estu:
  - membro kun papera versio de IPR 230 kronoj
  - membro kun elektronika versio de IPR 115 kronoj
11. Kiel prezidanto por la jaro 2012 estis elektita Agneta Emanuelsson.
  - Elekto de 4 estraranoj por 1 jaro: Sten Svenonius, Haldo Vedin, Ann-Louise Åkerlund kaj Kim J: henriksen.
  - Elekto de revizoroj por 1 jaro: Agneta Lund kaj Ulla Ullfors.
  - Komitatanoj de ILEI: Agneta Emanuelsson kaj Sten Svenonius.
  - Reprezentanto por Sveda Esperanto Instituto: Agneta Emanuelsson
  - Elektoprepara komitato por 1 jaro: vakas
12. Estis unuanime decidite malaprobi la decidon de la pasinta jarkunsido pri malfondo de ILEI-se.
13. La propono pri nova statuto de ILEI-se, datita 2012-05-05, kiu estis zorge pridiskutata dum la printempo de la membroj, estis prezentita de Sten Svenonius. En § 6 estu vortoredakto: "årsmöte" anstataŭ "årsstämma".  
Post diskuto la statuto estis akceptita per la jenaj ciferoj:  
Jes: 8  
Ne: 0
14. Estis demandite ĉu eblas membreco sen kotizo, kiun demandon la estraro promesis pritrakti.

La prezidanto esprimis dankon al la partoprenantoj kaj fermis la kunsidon.

Ĉe la protokolo  
Sten Svenonius

Ĝustigas  
Bertil Andreasson  
Ann-Louise Åkerlund